Pedibus Calcantibus en Odeso



Marino sur la korvilo de *Juna Amiko*

Eble vi jam legis pri Marino CURNIS – 33-jaraĝa itala esperantisto, mondvojaĝanto, verkisto, pentristo, muzikisto kaj simple agrabla homo, kiu en januaro 2006 komencis longan kaj nekutiman vojaĝon *Eurasia Pedibus Calcantibus: ene de kvin jaroj li planas trairi perpiede (!) la tutan Eŭropon kaj Azion. Kiam li gastis en Odeso, Ukrainio, gvidantino de Junulara Esperanto-Klubo "Verdaĵo" Tatjana AUDERSKAJA profitis la okazon intervjui Marinon. Kaj jen la rezultoj!**

- Kio interesa okazis dum via vojaĝo?

- Multaj interesaj aferoj okazas eĉ dum unu tago. Do imagu – se temas pri kvinjara vojaĝo! Post ses monatoj de la komenco de Eurasia Pedibus Calcantibus mi povus rakonti mil anekdotojn. Tamen, mi invitas vin vojaĝi, konatiĝi kaj sperti mem interesajn, nekutimajn kaj amuzajn situaciojn. Kaj se vi ne havas la eblon renkonti eĉ viajn najbarojn, tiam mi invitas vin legi kelkajn miajn anekdotojn rete: www.eurasiapc.com kaj http://epc.vagabondo.net. Eble vi havos alian elekton: fakte mi esperas eldoni ĉiujare po libro, komence en la itala lingvo, kaj poste traduki ilin Esperanten kaj eldoni.

- Ĉu ofte okazis miskomprenoj?

- Feliĉe ne. Lingvajn miskomprenojn mi povas eviti pro miaj konoj de diversaj lingvoj kiuj helpas al mi eĉ kiam mi tute ne konas la lokan lingvon. Kulturajn miskomprenojn mi evitas, ne pretendante koni multe pri loka kulturo. Kaj se miskompreno okazas, mi pardonpetas!

- Kiel helpis Esperanto dum via vojaĝo? Ĉu ofte troviĝas esperantistoj survoje?

- Vi scias: bedaŭrinde, esperantistoj ne estas multaj. Tamen multaj el ili gastigis/as/os min (koran dankon!), kaj pere de ili mi malkovradas Esperantan vivon kaj ilian urbon aŭ nacion. Bedaŭrinde, mi ne povas renkonti multajn aliajn esperantistojn kiuj loĝas malproksime de mia itinero. Tamen mi certas ke Esperanto estas taŭga lingvo por interkompreno, kaj mi daŭre diskonigas ĝin kiam eblas.

- Ĉu malfacilas ĉiam piediri? Ĉu ne estas iam tento entrajniĝi?

- Jes, malfacilas ĉiam piediri, ĉar nia vivmaniero ne permesas tion. Do, ni ne havas taŭgajn stratojn, nur stratojn por veturi. Kaj ankaŭ la korpo bezonas halti. Tial mi faras kelkajn paŭzojn, por ripozi kaj verki la libro-

jn pri la vojaĝo.

- Kiom da aĵoj vi portas? Ĉu ĉio bezonatas? Ĉu ĉio sufiĉas?

- Nune mi kunportas preskaŭ 40 kg, 14-15 el ili estas mia speciala "ĉaro" Rocinante**. Tamen, tagon post tago mi lernadas kio estas bezonata aŭ sufiĉa.

- Kiel vi trovas tranoktejojn?

- Kiam mi eksentas ke mia korpo estas laca, mi decidas kiom da tempo aŭ kilometrojn daŭrigi. Tiam certe kaj "hazarde" (nenio ja estas hazarda!) mi trovas tranoktejon. Foje estas loko por mia tendo, foje estas nova amiko. Mi havas ankaŭ adresojn el "Pasporta Servo" kaj aliajn similajn listojn.

- Kie vi manĝas? Kie vi aĉetas manĝaĵojn? Ĉu ofte vi kuiras mem? Se jes – do kion kaj kie?

- Mi precipe aĉetas manĝaĵojn en vendejoj. Se mi povas kiuri mem, mi aĉetas manĝaĵojn "kvazaŭ-italajn", ĉar mia organismo alkutimiĝis al ili kaj kelkfoje ili necesas. Se mi ne povas fari tion, mi aĉetas kion la vendejo proponas por rapida manĝo, ekz., pano kun fromaĝo. Tamen, kiam mi havas ŝancon gustumi lokajn manĝaĵojn, mi faras tion tre plezure. Krome, mi notas receptojn de bongustegaj (laŭ mi) manĝaĵoj kiuj plej plaĉis al mi.

- Kiom da ŝuoj vi eluzis? Kie vi lavas vestaĵojn?

- Feliĉe, mi ne havas problemojn pri ŝuoj, ĉar mi havas du sponsorojn: itala firmao *Crispi* donadas al mi ŝuojn *Monaco*, kiujn mi uzas precipe vintre, kaj alia itala firmao, *Lizard*, donadas al mi sandalojn, kiujn mi uzas ĉefe somere. Ankaŭ pri vestaĵoj mi havas sponsorojn: *Coolmax* kaj *Thermolite*, hispan-turka firmao, kaj *TRR*, itala. Tamen, vi pravas, mi devas lavi de tempo al tempo. Mi faras tion kiam eblas en domoj aŭ hoteletoj, aŭ... fontanoj.

Marino (meze) en Nepalo, 2001

Noto de la intervjuisto: Vere Marino havas tre interesajn sandalojn, kiuj allogis atenton de ĉiuj ĵurnalistoj en Odeso. Ili estas tre molaj sandaloj, faritaj kiel gantoj – kun aparta ujo por ĉiu piedfingro. Marino diris ke ili estas tre oportunaj por urboj.

- Kio estos la rezulto de via grandvojaĝo?

- Mi ne scias mian estontecon (ridetas), do, mi povas nur imagi ĝin. Espereble, mi atingos pli grandan kulturon rilate al nia Planedo kaj al ĝiaj loĝantoj. Mi konos kaj scios multe pli. Mi havos pli grandan horizonton pri mia vivo kaj vivo de la aliaj. Kaj mi esperas por mi mem ricevi sufiĉan famon, por ke mi povu vivi (gajni sufiĉe da mono) per mia arto: poezio, muziko, pentrado ktp. Eble denove vojaĝi kaj samtempe daŭrigi paroli al la mondo pri beleco kaj boneco de malsamaj kulturoj, pri paco kaj pri... Esperanto (ridetas). Tamen, kiel oni diras en Turkio kaj aliaj lokoj: "Inŝallah" – "Se plaĉos al dio".

* *Pedibus Calcantibus* – (de la latina) "per piedoj kiuj premas" [la teron].

** Rocinante [rosinante] – la ĉevalo de Donkiĥoto.